



1*86
(112)

Starto


ORGANO DE
ĈEĤA ESPERANTO-ASOCIO



**INTERNACIA JARO DE PACO 1986
PER ESPERANTO
POR LA MONDPACO**

STAVEBNICE PODVOZKU NÁKLADNÍHO PŘÍVĚSU

AK-2P



Obsahuje tyto díly:

x náprava	390,— Kčs
x oj	120,— Kčs
x podpěra	20,— Kčs
x pojistné zařízení	59,— Kčs
x 2 ks třmen (á A 12,50)	25,— Kčs
x 2 ks blatník vč. zdstěrek (á 85,—)	170,— Kčs
x nosník K 1000/0	250,— Kčs
2 pneu B-Scooter 4x8 (á 105,—)	210,— Kčs
2 duše (á 15,—)	30,— Kčs
2 disky 2,45x8" — typ A / (á 225,—)	450,— Kčs
x 2 hřídele (á 130,—)	260,— Kčs
	2 584,— Kčs

Montáž podvozku

(s vydáním tech. průkazu)	148,50 Kčs
Celková cena	2 732,50 Kčs

x úhelníkový rám korby	310,— Kčs
x ocelová korba	1 300,— Kčs
x oj s nosníky jen pro ocel. korbu	390,— Kčs

Technické údaje:

váha (bez korby)	cca 50 kg
celková hmotnost	400 kg
užitčné zatížení	320 kg
max. šířka	1 500 mm
délka	2 500 mm
výška	730 mm

Podvozek nákl. přívěsu AK-2P je bez elektrické instalace (zatím není dodáván panel pro tabulku SPZ vč. svítilen) a bez korby, která je v návrhu pro výrobu.

Na podvozek nákl. přívěsu AK-2P je nutno uzavřít písemnou objednávku. Formuláře objednávek vyžádejte na: INKLEMO VD, 100 00 Praha 10, Třebostická 3, tel. 78 14 749. Dodací lhůta podvozku (vč. montáže) je závislá na přijatém počtu objednávek. Zákazník bude písemně vyzván k osobnímu odběru.

Jednotlivé díly stavebnice označené x budou samostatně v prodeji výhradně v prodejních VD INKLEMO — Praha:

Praha 1, Skořepka 8	telefon: 26 68 24
Praha 2, Bělehradská 128	22 55 31
Praha 4, nám. Hrdinů 5	43 54 65
Praha 7, Dukelských hrdinů 4	87 80 16
Praha 8, Sokolovská 170	82 04 81
Praha 9, Sokolovská 201	83 14 24

Na tyto díly nebudeme přijímat objednávky, ani nebudou zaslány na dobírku (s výjimkou litinového nosníku K 1000/0).

Výrobek byl kladně testován (vč. podrobného popisu) v časopise SVĚT MOTORŮ č. 34/1983.

Inklemo Praha

GARDU LA PACON!



Sub ĉi devizo kunvenis sabate la 23an de novembro 1985 konferenco de la Porpaca Sekcio de Ĉeĥa Esperanto-Asocio en salono de la restoracio "Jalta" en la urbo Kladno. La traktado, dum kiu la pacaktivuloj de la ĈEA-lokaj grupoj pritaksis sian trijaran agadon, estis influita de la espero, veninta el la lasta renkonto de la superaj reprezentantoj de Sovetunio kaj Usono en Genevo. La prezidanto de MEM D-ro Imre Pethes en la ĉeĥa referaĵo resumis sukcesan rezulton de la Esperantista pacagado kaj aprezis specifan rolon de Esperanto en la pacagado: fariĝi ponto de la interkompreniĝo inter la homoj, kunigitaj per la plej nobla ideo en nuntempo - defendi la daŭran mondopacon. Dum la traktado gastis membrino de la Ĉeĥoslovaka Packomitato D-rino Švecová kaj membrino de la Distrikta Packonsilio de la urbo Kladno s-ino Čermáková. Ili memorigis al la delegitoj la 35jaran jubileon de la Monda Packonsilio, aprezis signifon de la klubo de Internacia Junulara Amikeco uzantaj Esperanton kaj same gravecon de reciproka informado de la esperantista kaj ĉeĥoslovaka pacmovadoj helpe de la gazetoj "Mír" kaj "Paco". Ĝenerale estis aprezita iniciato de UNO, kiu proklamis la jaron 1986 Internacia Jaro de Paco. La prezidanto de la Porpaca Sekcio de ĈEA Drahomír Kočvara pritaksis la plej sukcesajn agojn de pasinta periodo: partoprenon de ĈEA dum la Monda Asembleo por Paco kaj Vivo, kontraŭ la Nuklea Milito /en Prago 1983/, en kies kadro la esperantistoj aranĝis fruktodonan intersangon de la opinioj dum la renkontiĝo sub nomo "Komunikado inter la Homoj"; tri renkontiĝojn de la MEM-anoj en la urbo Pardubice 1983 ĝis 1985, kiujn entute partoprenis ĉirkaŭ 1,5 mil e-istoj el 14 landoj de la mondo kaj partoprenon de la junaj esperantistoj en la XIIa Monda Festivalo de Junularo kaj Studentaro en Moskvo 1985. Same alte estis aprezita iniciato de UEA, kiu dum la 70a Universala Kongreso en Augsburgoj akceptis specialan porpacan rezolucion kaj plivastigis ĉiujare atribuatajn premiojn de la Belartaj Konkursoj je plua "Premio de Paco". Alte estis aprezita porpaca politiko de USSR, merite de kiu la mondo jam kvardek jarojn vivas en paco. La prezidanto de MEM transdonis honoran insignon de MEM al la reprezentantoj de la ĈEA-grupo de la kultura Domo de Sindikatoj Dukla Pardubice por honorigi ilian oferecon ĉe la preparo de la esperantistaj pacrenkontiĝoj en Pardubice. Prezidanto de la porpaca Sekcio de ĈEA estis reelektita s-ano Drahomír Kočvara.

/Verkis Jaroslav Klement, gvidanto de la Gazetara kaj Informa Komisiono de ĈEA/

PROKLAMO

La internacia situacio ĝago post tago pliakriĝas kaj ankoraŭ neniam estis tiel danĝera, kiel nuntempe. Tio estas bedaŭrinda afero, se ni rememoros, ke ĉi jare solenas Monda Packonsilio sian 35an detrevenon.

Antaŭ kelkaj tagoj kunvenis estroj de du grandpotencoj en Genevo: Mihail Gorbacov kaj Roland Reagan. Ambaŭ poste konstatis, ke la renkontigo estis fruktodona, eĉ kiam ili ne havis la saman opinion en principaj demandoj. Antaŭ ĉio temis pri ŝtataj militoj, kie Reagan ne volis cedi. Sed tamen ili ambaŭ decidigis, ke kune strebos por malpermeso uzi kerniajn armilojn kaj por likvido de iliaj stokoj en la mondo. Estas necese plifortigi konfidencan kaj sekurecon en Eŭropo. Ambaŭ ŝtatestroj interkonsentis pri novaj renkontigoj: Mihail Gorbacov invitis prezidenton Reagan al Moskvo kaj reciproke prezidento Reagan invitis lin al Usono.

Ni esperantistoj kun gojo bonvenigas ĉiun sciigon pri malstreĉigo, sed tamen ni ne povas ĉesi nian paclaboron. Konservu la pacon por ni kaj por venontaj generacioj estas nia plej urga tasko.

Tial la partoprenantoj de la ĝenerala kunsido de la porpaca sekcio de ĈEA la 23an de novembro en Kladno unuanime aprobis sekvontan proklamon al ĉiuj esperantistoj en nia respubliko:

Preparu la 100jaran jubileon de ESPERANTO fidele al la pacidealo de doktoro Zamenhof, kreinto de la lingvo internacia. Agadu, ke la esperantistaro kaj la tuta homaro solenu en paco tiun grandan jubileon.

Ĉiuj pacamaj esperantistoj deklaras, ke ili subtenos ĉiujn seriozajn iniciatojn, celantaj haltigi la nuntempan veterarmadon. Aplikante la komunan lingvon, kiu helpas al la interkomprenigo, esperantistoj klopodas savi la pacon.

Venontan jaron 1986 deklaris Unuĝintaj Nacioj "Internacia jaro por PACO". Uzu ĉiujn eblecojn por organizi pacajn renkontigojn, pacmarŝojn, prelegojn kaj ekspoziciojn kaj klopodu varbi novajn anojn por la paca sekcio de ĈEA.

Partoprenantoj de la konferenco de la Porpaca Sekcio de ĈEA en Kladno. Kladno la 23an de novembro 1985.

porpaca sekcio

La Porpaca Sekcio de ĈEA povas fari multon por la daŭra paco, kunlaborante kun MEM-sekcioj en aliaj landoj. Ĝi povas disvastigi amikecon inter la popoloj, senmaskigi la mensogojn pri socialismaj regimoj. Senĉese multaj homoj ekonas la neceson de la paco. Novaj traktadoj komencigas, pacemaj esperantistoj mobilizas la esperantistaron por kontribui al la haltigo de la veterarmado.

La konferenco aprobas la raporton pri laboro de la Porpaca Sekcio dum la tuta periodo.

La Porpaca Sekcio de ĈEA prezentas jenajn ĝeneralajn taskojn:

- 1/ subteni la agadprogramon de MEM, aprobitan ĉijare en Augsburg;
- 2/ fari kontaktojn kun ĉiuj pacmovadoj enlandaj kaj eksterlandaj;
- 3/ kontraŭsteri ĉiun klopodon, celanta misformi la efektivigon de la principoj, fiksitaj en la Fina Akto de Helsinko;
- 4/ solidariĝi kun la popolaj movadoj batalantaj por paco, libereco kaj sendependeco;
- 5/ levi sian voĉon por likvido de la militaj konfliktoj;
- 6/ eduki novajn pacaktivulojn;
- 7/ organizi pacrenkontigojn ĉiujare en alia pli granda urbo, uzante la numeradon, kiun komencis Pardubice;
- 8/ organizi ekspoziciojn de kontraŭmilitaj desegnaĵoj kaj infandeseĝnaĵoj pri paco;
- 9/ eldoni kolekton /po 10-12 bildkartoj/ de kontraŭmilitaj desegnaĵoj de Pavel Rak;
- 10/ ĉiujare eldoni unu separaton de PACO;
- 11/ pligrandigi nombron de la abonantoj de PACO inter korespondkursantoj kaj inter ĉiuj Esperanto-rondetoj;
- 12/ publikigi artikolojn pri paca laboro de la esperantist-pacaktivuloj en esperantistaj kaj precipe neesperantistaj gazetoj kaj ĵurnaloj;
- 13/ plifortigi kontaktojn kun Monda Packonsilio, Ĉeĥa pac-konsilio kaj Distriktaj Packonsilioj;
- 14/ kontribui al fonduso de solidareco laŭ eblecoj;
- 15/ ligi kontaktojn kun enlandaj neesperantistaj brigadoj de socialisma laboro, kiuĵ estis honorigitaj per titolo "pacdefendantoj";
- 16/ ligi ĝemelajn kontaktojn kun alilandaj Esperanto-rondetoj, plej bone laŭ distriktaj eksterlandaj kontrektoj;
- 17/ mem organizi ekspoziciojn pri Hiroshima-Nagesaki por Parkoj de Kulturo kaj Ripozo /PKR/;
- 18/ disvolvi pere de korespondado de unuopuloj veran informadon pri vivo en socialisma lando;
- 19/ en la jaro 1986 - Internacia Jaro por Paco 1986 - organizi la 8an pacrenkontigon en Pardubice okaze de la pacmarŝo al Ležáky en junio;
- 20/ organizi ekskurson de la tuta Porpaca Sekcio al Versovio okaze de la 100jara jubileo de Esperanto;
- 21/ akiri por la tuta ĈEA honoran titolon "pacdefendantoj";
- 22/ la konferenco aprobas la komitaton de la Sekcio konsistanta el:

prezidanto: Dráhomír Kočvara,

membroj: ing. Margit Turková, Alena Klementová,
Milada Hemerková, Jan Řepa, Otilie Ba-
rešová, František Sedláček, Jiří Sla-
vák, Ludvík Chytil,

anstataŭantoj: Pavla Rablová, Ludmila Srbová.

Porpaca Sekcio de ĈEA
Kladno la 23an de no-
vembro 1985

NIA MOVADO STARAS ĈE SOJLO DE GRAVAJ SOLENAĴOJ, per kiuj ĉiuj esperantistoj almemorigos al la tuta mondo, ke la internacia lingvo Esperanto vivas kaj perfekte servas al interkomprenigo jam cent jarojn. Ankaŭ la Ĉeĥa Esperanto-Asocio volas kontribui al tiu ĉi elstara jubileo per agoj, kiuj vekos vastan resonon inter la ĉeĥa publiko, kiuj al nia membraro alportos neforgeseblajn rememorojn kaj kiuj ankaŭ plinombrigos niajn vicojn. La estraro de ĈEA akceptis riĉan planon por jubileo, kiun oni jam anoncis pere de "Informoj de ĈEA" al ĉiuj lokaj grupoj kaj movadaj funkciuloj. Sed: ĉiu grava ago bezonas adekvatan rimedon. Precipe la agoj prijubileaj, ĉar ilin ni devas realigi paralele kun kutima ĉiujara agado de nia asocio.

Tial la Centra Komitato de ĈEA decidigis fondi

jubilean fonduson

kies celo estas prizorgi necesajn financajn rimedojn por subteni ĉefe la jubileajn eldonaĵojn, eventuale kun ili ligitajn plurajn aranĝojn. La Centra Komitato atendas de ĉiuj fidelaj esperantistoj kaj ankaŭ de amikoj de Esperanto en nia respubliko, ke ili grandanime donacos monon al la fonduso. Ĉiun donacinton oni publikigos en "Starto". Por la plej malavaraĵoj donacintoj, kiuj donacos minimume 100 Kčs, estas preparita belaspekta jubilea dankdiplomo, kiun oni publike transdonos al la koncernulo.

Jen la okazo por ĉiuj montri, ke nian lingvon kaj la movadon oni subtenas ne nur buŝe kaj morale, sed por ili oni ankaŭ pretas oferi parteton de propraj monuoj.

La donacojn oni sendu nur per Poŝtĉekoj de la asocio kun kodo: 375.2. Petu la pagilon en sekretariejo!

VK

1887



1987

UNESKO ● POR ● ESPERANTO

La 23a sesio de la Ĝenerala Konferenco de UNESKO, okazinta en Sofio de la 8a de oktobro ĝis la 12a de novembro 1985, akceptis ĉiuvoĉe la 8an de novembro 1985 novan rezolucion favore al Esperanto. La rezoluciproponon prezentis la jugoslava delegitaro kune kun ses kunsubskribantoj: Ĉinio, Bulgario, Hungario, Kostariko, Sanmarino kaj Pollando.

La akceptita rezolucio n-ro XI. 4.4.218 tekstas jene:

Celebrado de la centjariĝo
de la kreado de Esperanto

Oslavy století esperanta

La Ĝenerala Konferenco,

Valné shromáždění,

konsiderante ke dum sia sesio de 1954, okazinta en Montevideo, ĝi per sia rezolucio IV.1.4.422-4224, notas la rezultojn atingitajn pere de la internacia lingvo Esperanto sur la kampo de internacia intelekta intersanĝo kaj de reciproka interkomprenigo inter la popoloj de la mondo, kaj rekonas ke tiuj koincidas kun la celoj kaj idealoj de UNESKO,

berouc v úvahu, že na svém zasedání v r. 1954 v Montevideu přijalo rezoluci IV.1.4.422-4224, v níž vzalo na vědomí výsledky, dosažené mezinárodním jazykem esperanto v oblasti mezinárodních intelektuálních styků a vzájemného porozumění mezi národy světa, a uznalo, že tyto souhlasí s cíli a ideály UNESCO,

memorigante ke Esperanto ekde tiam multe progresis kiel ilo de interkomprenigo de popoloj kaj kulturoj de diversaj landoj, penetrante en la plimulton de regionoj de la mondo kaj la plej multajn homajn aktivadojn,

připomínajíc, že mezitím esperanto učinilo značný pokrok jako nástroj dorozumění mezi národy a kulturami různých zemí, proniknuvši do většiny krajů světa a většiny lidské činnosti,

rekonante la grandajn eblecojn kiujn prezentas Esperanto por la internacia komprenigo kaj la komunikado inter popoloj de malsama nacieco,

uznávajíc velké možnosti, které poskytuje esperanto mezinárodnímu dorozumění a komunikaci mezi lidmi různých národností,

notante la tre grandan kontribuon de la Esperanta movado, kaj precipe de la Universala Esperanto-Asocio, en la diskonigado de informoj pri la aktivado de UNESKO, samkiel ĝia partopreno en tiu aktivado,

konscia pri la fakto ke en 1987 Esperanto festas sian centjarigon de ekzisto:

1. Gratulas la Esperantomovadon je ĝia centjariĝo,

2. petas la ĝeneralan direktoron daŭre sekvi kun atento la evoluon de Esperanto kiel ilo por pli bona interkomprenigo inter popoloj kaj kulturoj,

3. invitas la Ŝtatojn-Membrojn signi la centjarigon de Esperanto per konvenaj aranĝoj, deklaroj, eldonoj de specialaj poŝtmarkoj ktp., kaj iniciati la enkondukon de studprogramo pri la lingva problemo kaj Esperanto en siaj lernejoj kaj institutoj de supera lernado,

4. rekomendas al la internaciaj neregistaraj organizoj aliĝi al la festado de la centjariĝo de Esperanto kaj pristudi la eblecon uzi Esperanton kiel ilon por la diskonigo de ĉiuspecaj informoj inter siaj membroj, inkluzive informojn pri la laboro de UNESKO.

berouc na vědomí velmi závažný příspěvek esperantského hnutí a zejména Světové esperantské asociace k rozšiřování informací o činnosti UNESCO jakož i o její účasti v této činnosti,

jsouc si vědomo skutečnosti, že v r. 1987 se bude slavít 100 let existence esperanta:

1. gratuluje esperantskému hnutí k jeho 100. výročí,

2. žádá generálního ředitele, aby trvale pozorně sledoval vývoj esperanta jako prostředku ke zlepšení porozumění mezi různými národy a kulturami,

3. vyzývá členské státy, aby upozornily na sté výročí esperanta vhodnými akcemi, deklaracemi, vydáním zvláštních známek apod. a podněcovaly zavedení studijního programu o jazykovém problému a o esperantu ve svých školách a institucích vyšší výchovy,

4. doporučuje mezinárodním nevládním organizacím, aby se připojily k oslavám 100. výročí esperanta a prostudovaly možnost, jak využít esperanta jako prostředku k rozšiřování všech informací, včetně těch o akcích UNESCO, mezi svými členy.

Por rememorigi al vi la rezolucion de UNESKO el la jaro 1954 ni publikigas ankaŭ ties tekston:

IV. 1.4.422 La Ĝenerala Konferenco, diskutinte la Raporton de la Ĝenerala Direktoro pri la Internacia Peticio favore al Esperanto /80/PRG/3/;

IV. 1.4.4221 notas la rezultojn atingitajn per Esperanto sur la kampo de la internaciaj intelektaj interŝanĝoj kaj por la proksimigo de la popoloj de la mondo;

- IV.1.4.4222 rekonas, ke tiuj rezultoj respondas al la celoj kaj idealoj de UNESKO;
- IV.1.4.4223 notas, ke pluraj Ŝtatoj-Membroj informis pri sia preteco enkonduki aŭ ampleksigi la instruadon de Esperanto en siaj lernejoj aŭ superaj edukaj institucioj, kaj petas tiujn Ŝtatojn-Membrojn informadi la Ĝeneralan Direktoron pri la rezultoj atingitaj sur tiu kampo;
- IV.1.4.4224 komisiis la Ĝeneralan Direktoron sekvi la kurantajn evoluojn en la uzado de Esperanto en scienco, edukado kaj kulturo, kaj tiucele kunlabori kun Universala Esperanto-Asocio en aferoj koncernantaj ambaŭ organizaĵojn.

La ĉeflingva teksto de tiu ĉi rezolucio estas jena:

Generální konference prodiskutovala zprávu generálního ředitele o Mezinárodní petici ve prospěch esperanta, zaznamenala dosažené výsledky esperanta na poli mezinárodních kulturních styků a pro sblížení národů ve světě,

konstatuje, že tyto výsledky odpovídají cílům a ideálům UNESKO,

zaznamenává, že mnohé státy vyjádřily připravenost zavést nebo rozšířit vyučování esperanta ve školách základních nebo vyšších a nábádá tyto členské státy, aby informovaly generálního ředitele o výsledcích, dosažených na tomto poli,

pověřuje generálního ředitele sledovat běžný rozvoj použití esperanta ve vědě, výchově a kultuře, a v tomto směru spolupracovat se Světovou esperantskou asociací v záležitostech, které se týkají obou organizací.

La du gravajn rezoluciojn de UNESKO kompletigu per aliaj dokumentoj, kiel ekz. la interkonsento inter MEM kaj la Monda Pac-Konsilio, kaj uzu ilin por argumentado pri Esperanto en via urbo aŭ vilago, en via kulturdomo, uzina klubo, nacia komitato, Nacia fronto, distrikta pac-konsilio ktp. Kaj informu nin pri viaj spertoj kaj sukcesoj.



La MEM-konferencon en Kladno partoprenis la prezidento de MEM D-ro Pethes



La Ĝenerala Direktoro de Unesko sendis al la 70a Universala Kongreso de Esperanto en Augsburg jenan telegramon:

En la momento kiam, sub la titolo "Antikvo kaj moderno", vi dediĉas viajn laborojn al tiu malfacila ekvilibro inter la prava respekto al la pasintaĵoj kaj al la neprokrastebla bezono pri evoluo, mi volas bondeziri al via 70a Kongreso la plej grandan sukceson. La agado de via Asocio pritraktas samtempe la kreadon de originalaj verkoj kaj la disvastigon - dank al la tradukado - de la tutmondaĵ literaturaj ĉefverkoj. Ĝi do ŝenĉese trovigas antaŭ delikataj elektoj: kiel priĉecidi "kion ŝangi, kion konservi?" La estetikaj kriterioj ŝangigas, la relativa graveco de la eventoj estas taksata malŝame laŭ la epokoj kaj regionoj. La eblecoj por realigado ne ĉiam atingas la nivelon de la esperoĵ aŭ de la bezono. La internaciaĵ organizaĵoj ne povas proponi univiersalan elektokriterion, sed ili devas laŭeble provi kapti intereson de la publiko, instigi al konsciigo pri la graveco de la demando, kunigi la rimedojn necesajn por la konservado. Siaflanke, Unesko laboras por diskonigi kaj aprezi la grandajn atingojn de la pasinteco, inventari kaj kuragigi la konservadon de la kulturaj heredaĵoj, ĉu spiritaĵ, ĉu materiaĵ, ĉar ili estas la plej evidenta esprimo de la genio de la popoloĵ, por disvastigi la intelektajn kaj artajn valorojn, cele al reciproka pliriĉigo, por pluinstigi la kreivan evoluon. Ĝiaĵ statoĵ-membroĵ tiamaniere disponas pri elementoj nemalhaveblaj por alpreni decidoĵn. Unesko tiele volas ĵa plue instigi la agadon de Asocio kiel la via, kiu favoras la reciprokajn konatigojn de la malsamaj popoloĵ kaj laboras por pli bona internacia komprenigo.

Amadou-Mahtar M' Bow

Ĝenerala Direktoro

El la 9a numero de "Esperanto"

La prezidanto de UEA sendis jenan telegramon al la Konferenco pri Sekureco kaj kunlaboro en Eŭropo:

Universala Esperanto-Asocio, kunvenante en Augsburg, sendas siajn salutojn al la finna registaro kaj al la aliaĵ subskribintoĵ de la Fina Akto de Helsinko okaze de ties deka datreveno. La Fina Akto reprezentis signifan paŝon antaŭen en la internacia kunlaboro. En tiu senco ĝiaĵ celoj koincidas kun tiuj de Esperanto-movado, kiu instigas kaj faciligas la komprenigon trans landaj kaj lingvaj limoj. Ni esperas, ke tia komprenigo vaste plibonigos en estontaj ĵaroĵ, ĉar ĝi konsistigas la plej bonan fundamenton de daŭra internacia paco.

La 31an de julio 1985 Grégoire Maertens, prezidanto de UEA

El la 9a numero de "Esperanto"

VIGLAS ESPERANTO EN ĈEĤOSLOVAKIO

Andy E. Künzli vizitis en marto 1985 Ĉeĥoslovakion kaj kontaktis esperantistojn en Brno, Jihlava, Poprad kaj Košice.

En Ĉeĥoslovakio, kiu laŭkonstitucie konsistas el du respublikoj, la ĉeĥa kaj la slovakaj, ekzistas ne unu tutŝtata Esperanto-Asocio, sed du respubliknivelaĵoj: Ĉeĥa Esperanto-Asocio /ĈEA/ kiu estis fondita en 1970 kun sidejo en Praha /Prago/, kaj Slovaka Esperanto-Asocio /SEA/, fondita en 1969 en Poprad, kiu situas piede de la Altaj Tatroj, en la "Slovaka Paradizo".

Historiaj cirkonstancoj ebligis al la Esperanto-movado en Ĉeĥio pli fruan kaj pli viglan disvolvigon ol en la slovakaj partoj de la ŝtato. Tial en Ĉeĥio /Boĥemio kaj Moravio/ vivas pli granda nombro da esperantistoj ol en Slovakio, kiu teritorie estas pli malgranda ol la ĉeĥa respubliko. Tamen en la lasta tempo oni povas observi en Slovakio tre dinamisman kaj konkretan Esperanto-agadon, ĉefe ĉirkaŭ Poprad, kie la esperantistoj povas akiri malnovan, sed carman asocian domon, el kiu la aktiveco direktigas. Se ni hodiaŭ rigardas la Esperanto-kalendaron de Ĉeĥoslovakio, ni konstatas, ke la plimulto de la aranĝoj okazas ĝuste en Slovakio: ekzemple la Somera Esperanto-tendaro kun kursoj kaj ripozo en Lančov, la Somera Esperanto-lernejo en Jasov kaj la Turismaj Esperanto-tagoj en Žilina estas eventoj, kiuj ĉiujare denove pasas kun sukceso. La "lingvoinstruado de Poprad" jam akiris internacian reputacion. Por la koresponda kurso interesiĝis 300 personoj. Al la "duon-intensivaj kursoj", kiuj laŭ la "rekta metodo" disvolvigas dum 10 renkontigoj, aliĝas meze 120 personoj: progresintoj kaptas la okazon klerigi en 60hora kurso. La plenkreskuloj kaj pioniroj lernas kaj amuziĝas dum 14taga somera Esperanto-lernejo. Mi mem povas sperti, kiel carme la engagita esperantisto ing. Milan Zvara instruas al dek infanoj de la unua kaj tria klasoj de Poprad laŭ la aŭdvida /rekta/ metodo.

En la moravia ĉefurbo Brno mi estis invitita al rondo de la ĉirkaŭ 80jara, sed ankoraŭ ege vigla Josef Vondroušek, kiu enkondukis neesperantistan publikon "en la sekretojn de Esperanto". Ĉeflingve li havigis rigardon super la planlingva historio, klarigis avantaĝojn de Esperanto kaj montris al la interesatoj tiujn Esperanto-literojn, kiuj samas kun la ĉeĥa alfabeto, respektive diferencas de ĝi.

Por ne forgesi la junularon notendas, ke ambaŭ respublikaj asocioj havas po unu junularan sekcion, kiuj ambaŭ estas landaj sekcioj de TEJO. La prezidantino de la junulara sekcio de ĈEA, Maša Vančurová, estas eĉ estraranino de TEJO pri landa agado en Eŭropo. Frapa estas la kongruenco de la organiza mal-longigo de la junaj esperantistoj de Slovakio kaj de Svislando, nome JES, kiu sisteme kaŭzis dubojn ĉe la svisoj, ĉu bapti sian novan organizaĵon fakte per "Junularo Esperantista Svislanda" kompare kun la junaj esperantistoj en Slovakio.

"Starto" nomigas la bulteno de la ĉeĥaj esperantistoj. Tial mi deziras sukcesan starton por la novformata revuo de la slovakoj: "Esperantisto Slovaka". /AEK/

La artikolon ni legis en la septembra /1985/ numero de "Svisa Esperanto-Revuo". La aŭtoro estas funkciulo de TEJO kaj redaktoro de revuo "TEJO tutmonde". Etaj neprecizaĵoj, ekz. ĈEA estis fondita en 1969, Lančov estas en Moravio, ne senvalorigas la tekstojn, kiu instigas nin al ankoraŭ pli bona laboro. Ni faros ĉion por tio, ke "Starto" de nun pli regule startu!

LA ESPERANTO-MOVADO EN IRANO inter la jaroj 1979-1984 dum la islama revolucio.

Dum tiu periodo la Esperanto-movado spertis tri fazojn rilate al la t.n. revoluciaj instancoj de la lando:

a/ Unue tre aŭ eble eĉ tro favora revolucia sinteno al Esperanto.

En 1979 ekflamis la fajro de la islama revolucio. La juna Esperanto-movado troviĝis kune kun la irana popolo la kri-zajn tagojn de la reĝimo-sangigo en la lando. Kaŭze de la revolucia furoro ankaŭ la Esperanto-movado denove ekprosperis. La scipopolitika neutraleco kaj la kontraŭdiskriminacia karaktero de la lingvo Esperanto estis mem favoraj faktoroj fariĝin des pli bonvena kaj alloga al la revoluciema Irano. En la sociologiaj lernolibroj de la iranaj gimnazioj aperis multpagaj kapitroj pri Esperantaj kulturo kaj lingvo, verkitaĵoj de prof. Saheb-Zamani. La librojn legis pli ol 1,5 milionoj da gelernantoj kaj tiel konatigis kun Esperanto. Sekve dekmiloj da petleteroj, skribulaĵoj, telegramoj alfluis al la Ministerio pri Edukado el la tuta lando. Resume, ili petis, ke post tia revolucia paŝo pri la prezentado de Esperanto en la lernejoj oni faru duan paŝon: "Oficialigu Esperanto en Irano kaj dissendu instruistojn por ĝia instruado!" Ĉi tiu landvasta postulo, en la tre malfacila komenca tempo de la revolucio, fariĝis granda kultura ŝoko por la pli multo de la funkciuloj. La lernopetoj multis, sed la eblecoj mankis. Oni petis la konsilon de Saheb-Zamani, kiu ellaboris instruplanon.

Jen kaj jen Esperanto prezentigis ankaŭ en la irana gazetar, glore kaj atentokapte, kiel iu grandioza kultura fenomeno, harmonia al la plej respektindaj ideoj de la ĵus liberiginta Irano. Apenaŭ trovigis ĵurnalo aŭ revuo, en kiu oni ne prilaudintus Esperanton en ampleksaj kaj ilustritaj artikoloj.

En somero 1980 okazis la Kultura Revolucio en Irano. Ĉiuj universitatoj en Irano fermiĝis por ĉirkaŭ tri jaroj. Sekve, la Esperanto-agadoj ankaŭ tiutempe devis cesi. La kursoj limiĝis je la lernejoj kaj moskeoj. En somero 1981 oni instalas la Iran-Esperanto-Domon por plikoncentrigi la disajn agadojn, faciligi la internaciajn kunlaborojn. La Domo jam funkciis kiel viga centro de la movado.

b/ Dua, tre malfavora fazo.

La komenco de la milito inter Irano kaj Irako kaŭzis suspektoplenan etoson en la lando. Reakciuloj ekis kontraŭstarician revolucion atingajn kaj avangardaĵon. Esperanto ne estis escepto. Grave rolis ankaŭ la kontraŭagadoj de instruistoj pri fremdaj lingvoj kiel la angla kaj franca, cele al la subteno de iliaj postenoj, ĉar Esperanto montirgis forta konkuranto de ĉi tiuj lingvoj. En vintro 1982 en kelkaj gazetoj aperis arti-

koloj kun severaj akuzoj kaj atakoj kontraŭ la Esperanto-movado. Dum multaj monatoj Esperanto igis inkubsonĝo por multaj personoj. Fakte eĉ nura simpatiesprimo por Esperanto farigis vivdangera. Sekve miloj da komencantoj forlasis la kursojn kaj ĉiuloke fermigis la kursejoj. La movadaj aktivadoj ĉesis kaj limigis al hejmaj rondoj. Dank al la senĉesa persisto, trafikaj kaj privilegiaj reagoj de prof. Saheb-Zamani, la movado finfine transpasis la gravan krizon. Mirinde, nelonge post la atakoj ekaperis en iu tre radikale dekstra revolucia ĵurnalo iu absolute poresperanta artikolo /kun la bildo de Zamenhof/.

c/ Tria, nefavora kaj ne tre antagonisma fazo.

Iom post iom, dum la lastaj monatoj de 1983, la movado spertis nefavoran kaj ankaŭ ne akute malfavoran sintenon flanke de la oficialaj instancoj. Tamen restas ankoraŭ pli ol iom de tiu nigra nubaro de suspekto malhelpa. Nun la movada strategio devus ŝanĝigi jene: "Anstataŭ la kvanton oni prizorgu la kvaliton! Oni zorgeme selektu volontulajn homfortojn por Esperanto." Por Esperanto per scienco, por scienco per Esperanto: la scienco estas la plej neŭtrala kaj universale akceptebla atingajo homara. Do oni kunigu la universalan lingvon kun la plej neŭtrale kaj universale akceptebla atingajo homara. Baza sciencteknika literaturo faras Esperanton pli enhavorica, pli serioze konsiderinda kaj malpli skeptike akceptebla. Reciproke ankaŭ Esperanto faras la bazan sciencteknikan literaturon pli amplekse legebla, vere pli universala kaj siacele pli efektivebla. La eldonado de unu baza sciencteknika tekstolibro esperantlingva multe pli valorus ol centmiloj da favoraj ĉirkueroj, literaj komplimentoj de iuj ŝtataj aŭtoritatuloj aŭ solena rekomendo de UN, Unesko ktp. Esperanto bezonas verkojn pli palpeblajn, pli praktikajn kaj ĉiutage uzeblajn, kiel librojn pri diversfakaj enciklopedioj, sciencteknikaj temoj por la junularo de la Tria mondo. Se oni havintus la aluditan sciencteknikan literaturon esperantlingvan dum la febra revolucia tempo, malgraŭ ĉio oni havintus la okazon instali la unuan universalan Universitaton Esperantlingvan. Dum 1983 rearangigis la Iran-Esperanto-Domo, la kursoj ktp. Ekde vintro 1982 aperis la bulteno IER /Iran-Esperanto-Raportas/.

La irana movado surbaze de sia nova strategio klopodas laŭeble ĉiujare prezenti al la mondo grupon de novaj delegitoj ĉiurilate taŭgaj kaj fidindaj. En la UEA-ĵarlibro aperas 13 fakdelegitoj kaj 2 junulardelegitoj iranaj. Revuo "TEJO tutmonde" sendigas al trideko da adresoj en Irano.

Iomete pozitive la irana ŝtato lasttempe donis la eldonpermeson por multaj Esperanto-libroj. Resume: kio okazis al Esperanto en Irano, povus tre facile okazi aliloke en la vasta Tria mondo, kie la amase soifanta junularo por progreso serĉas pli facilan ilon por sia celo. /El "Iran-Esperanto-Raportas": 35/15/11/1984./

Dum la 41a IJK en Eringerfeld en 1985 la irana reprezentantino submetis en prelego sekvantajn proponojn:

- diŝkonigi la triamondon kulturon pere de Esperanto, kio ricigus la mondan literaturon
- havigi la kulturon de etaj nacioj pere de Esperanto kaj tiel starigi universalan kulturon

- akceli la dungigon de lokaj spertaj Esperanto-instruistoj /eble akiri eksterlandajn instruistojn/
 - organizi dusemajnajn UKojn de UEA ĉiun duan jaron por ke a/ UEA pli efike povu organizi ilin kaj b/ la partoprenantero povu pliprofundigi en la kongresan temon
 - okazigi EKn kaj IJKn en la sama lando
- /Fragmente transprenita el "TEJO-tutmonde" nro 5/1985/

SAGA VOJO: UZI ESPERANTON

Inter la diversaj revuoj eldonataj de Unesko estas ankaŭ "Internacia socia scienca revuo", kiu eldonatas angle, france kaj hispane en apartaj eldonoj. La sama revuo aperas ankaŭ arabe, ĉine kaj turke, respektive en Tunizio, Ĉinio kaj Turkio. En ĝia numero 36/1 1984 troviĝis 11 artikoloj pri lingvoj sub la komuna titolo "Interagado tra lingvo". La plej interesa por ni estas la artikolo "La lingva problemo en internaciaj organizoj" verkita de prof. J.E.Humblot de la Universitato de Mons /Belgio/. Lia 13paga artikolo ilustras nian lingvan vidpunkton iagrade. Esperanton li rigardas kiel duonplanlingvan, kompare kun planlingvo kaj natura lingvo. El lia artikolo ni prenas kelkajn citaĵojn:

"La ĉampionaj naciaj lingvoj en iu ajn ŝtato rigardas planlingvojn kiel potencialajn malamikojn.

La kultura argumento efektive ignoras la fakton, ke la hodiaŭa kulturo enkluzas teknikon, precipe en dato-procedo, ne malpli ol la naturaj lingvoj, en ĉiuj siaj riĉeco kaj senfinaj nuancoj de opinio. Havas nenian sencon defendi maturajn lingvojn kontraŭ planlingvoj, kiam la kulturo de la edukitaj homoj, kiuj povas esti parolantaj ilin, estas ne plu historia kaj literatura, sed penetrita de la kulturo de la komputila epoko.

Tial ni konsideras, ke nur planlingvo povas preventi la sufokmurdon de iu lingvo super alia kun ĉiaj ĝiaj ekonomiaj kaj kulturaj konsekvencoj. Kun la ebla escepto de angle parolantaj socioj, ĉiuj aliaj nacioj kaj parolantoj profitos el la kreo de neutrala planlingvo.

Estas ankoraŭ loko apud loka lingvo, por la uzo de internacia lingvo en lernejoj, kiu servus kiel vera perilo de kulturo. Por tio sufiĉas doni la instruon de planlingvo, duhore semajne en la periodo de 2 aŭ 3 jaroj.

La planlingvo laŭgrade komencos cefroli en internaciaj organizoj, sen altigi falsajn esperojn en iu ajn loko.

Estas vere bedaŭrinde, ke dum sia 40jara ekzistado Unesko ne faris plian progreson en solvado de ĉi tiu problemo de planlingvoj."

La profesoro, surbaze de la esploro de Eŭropa Komunumaro por automata tradukilo EUROTRA /kiu tradukas per pontolingvo, eventuale Esperanto, al ĉiuj lingvoj de EK/ esprimas sian esperon: "Ĝi /eurotra/ povos generi novan, hodiaŭan planlingvon." Fine li konkludas: "Se tio ne povas esti atingita, tiam, la saga vojo estas uzi Esperanton kiel nian universalan lingvon."

El "UN kaj ni" 38/1985



S-ano Karel Kraft el Županovice, distrikto Příbram, ĝisvivas la 24an de februaro 1986 sian 60jaran vivjubileon. Lia nomo estas bone konata el nia esperanta preso kaj en eksterlandaj redakktejoj, precipe de Pola Radio en Varsovio. Li estas elstara esperantisto kaj pro lia alta lingvosciig kaj pro lia pormovada aktivado. La modesta samideano dediciis sian tutan vivon al eduka de junularo precipe esperanta. Li estis unu el la fondintoj de la tradicio de Someraj Esperanto Tendaroj en Lančov kun grupo da junuloj, kiuj tiam kurage aranĝis tendaran instruadon laŭ firma pedagogia plano. Dank al lia agado ni hevas nun firman kadron da meritplenaj instruistoj kaj fidelaj esperantistoj, kiuj daŭre aktivis por disvastigo de nia kara lingvo. S-ano Kraft, promociita pedagogo, lingve elstarigis. Per korektado, kontribuado en diversajn eksterlandajn kaj enlandajn gazetojn, per sia agado en pedagogia sekcio kaj ekzamena komisiono, per sia aktiveco dum lastaj jaroj en teknika sekcio, li dank al sia pedagogia kapablo edukis multajn eminentajn esperantistojn. De siaj amikoj kaj dankemaj lernantoj li simbole akceptu bukedon da deziraj de firma sano, pluaĵ sukcesoj kaj vivkontenteco en sekvaj jaroj de ripozo!

Hradil

Ĉeĥoslovaka Radio elsendas per sia stacio Praha ĉiutage en semajno de lundo ĝis ĵaŭdo ĉiam de la 8a horo matene relation "... kaj la jaroj pasas" /.... a léta běží/. En tiu relation parolas pri sia vivo multaj merititaj laboruloj el diversaj laborbranĉoj kaj agadkampoj, ekz. sciencistoj, artistoj, elstaraj laboristoj, publikaj kaj honorindaj personoj.

Ĵaŭde la 15an de majo 1986 havis sian programon RNDr-o Vlastislav Zázvorĉka, CSa., 83jara laboranto de Nacia Muzeo en Praĝo. Li estis ĝis la jaro 1985 ĝia direktoro, nun li aktivis plu en sia fako biologio. Dum la rakontado pri sia vivo kaj laboro - kiu estis tre interesa - li menciis ankaŭ siajn fakajn kontaktojn kaj ligojn kun sciencistoj en eksterlando kaj siajn studan kaj publikigan aktivadojn. Li diris, ke por tio li uzas krom aliaj lingvoj ankaŭ Esperanton, kiu estas por li bona perilo, samvelora kiel aliaj mondlingvoj.

Certe estas utila afero, se ĉeĥaj radio-aŭskultantoj tiel estas informitaj pri Esperanto, kiu servas helpilo inter fakuloj kaj sciencistoj de la tutmondo, ĉar tiu ĉi flanko de la uzo de internacia lingvo Esperanto ne estas inter nia publiko sufiĉe vaste konata.



Karel Ĉapek kaj Esperanto

estis la temo de vespera arango de la Societo Karel Ĉapek en Lyra Pragensis - Muzikteatro en Praha, la 18an de novembro 1985. Verkisto František Kožík, Merithava Artisto, elmontris aplikon de Esperanto precipe en la radio-sfero /artprogramoj de la Verda Stacio/, poeto Jiří Karen reliefigis la utiligon de Esperanto en la literaturo, Josef Vondroušek rakontis pri sia esperantigado de verkoj de Ĉapek. La titolpagoj de la verkoj estis projekciaj kaj ankaŭ kelkaj numeroj de la brazila FONTO, en kiu ĉeĥaj verkistoj havas sian domicilon. El disko aŭdigis recitado de la skoto William Auld, Karel Höger, Nacia Artisto de Ĉeĥoslovakio, rakontis /per sonregistro/ pri sia agrabla sperto pri Esperanto. Deklamistino Vladimíra Kottašová montris, kiel sonas la internacia lingvo en versoj kaj prozo.

Personaj rememoroj de la citita elito instruis kaj ankaŭ amuzis la kontentan neesperantistan publikon en salono plene okupita, pluraj spektantoj devis stari.

Ĝi estis impona publika arango /disvendita unu monaton antaŭ la okazigo/. /J.Mařík/

Por Esperanto-arto la suno ankoraŭ ne subiras

Renkontiĝante kun vera kaj sincera arta konfeso oni ofte subite ektrovigas en alia, por ni nekonata, rava mondo - en tiu prikantata de la artkreinto.

La samon spertis la pragraj esperantistoj, dum sia kluba kunveno, la 27an de januaro 1986. Premiere enprogramita estis la surbendigita kompilaĵo de meditemaj versoj de Eli Urbanová, al kiuj pruntis sian ĉarman voĉon Eva Seemannová.

Pro tiu ĉi feliĉa kunigo de la arto de du famaj unuarangaj artistinoj - eksplodis bombo, ne nuklea, ĉi-foje poema. Ravitaj ni auskultis la tragedian riproĉon de la autorino, akuzanta la sorton pri forrabo de sia juneco, amo, amindumo, amatoj kaj adiaŭanta ĉion, kio carmigis sian vivon.

Kiom da kuraĝo necesis por tia gisfunda kaj senindulga nudigo de propra interno, fare de la pasia virino.

Kiom da raviga belo malkovris al ni en siaj versoj la aktorino, impresige pentrante per sia voĉo la tutan doloron de malfeliĉa, maljuniganta, soleca virino, kiu devis akcepti la krudan faton, forprenintan de ŝi unu amaton post alia.

Ni plejparte jam konis la ĉiuflanke eksterordinare perfektajn versojn de nia fama poetino, sed ĉi foje ekestis, per la unuigo de ambaŭ eminentaj artistinoj, unike altnivela prezentado.

La unuopajn poemojn interspacigas multe da ĉarma muziko -

ĉefe Pajnoŝalmo kun orgeno, orkeŝtro aŭ gitaro - kiu kulminigas per dolĉaj ŝonoj la superban aŝskul-ton.

Malofte oni guas - reciproke pro la lingvokono - tiom da emociiga altvalora arta baleco kaj mi esperas, ke ne nur mi, sed la tutmonda esperantistaro havos la saman okazon....

H.S.

La 26an de februaro prelegis pri Esperanto prezidentino de KEP-en Fono-klubo Prago, "Jonáš sekcio", por ĉirkaŭ 50 personoj, neesperantistoj. La intereso estis granda, kio pruvas diskuto preskaŭ tuthora, kiun partoprenis ankaŭ s-ano Howard. Per longdaŭra aplaŭdo oni montris sian simpatian al la lingvo kaj movado.

St.



korespondi deziras*

19jara bulgario deziras korespondi, interesas lin la muziko kaj sporto, li ŝatas fajfi, kanti kaj ludi gitaron: Julian Bisrov Ognianov str. Anton Strasimirov No 9, BOJUROVO, okr. Razgradsko, BG-7335, Bulgario

20jara hungaro, studento de Muzika Altlernejo, volus konatigi kun esperantistaj gemuzikistoj de nia lando, li ludas violoncelon kaj li atendas unuavice letegojn de arĉinstrumentistoj, ĉar li volas baldaŭ kun ili muziki arĉkvarteton kaj trion: Wachlik Mario, Léva kőz 2. III.64., KAPOSVAR, 7400, Hungario

Evgenij Viktoroviĉ Ustjancev /33 j./, doktoro, deziras korespondi tutmonde pri muziko, sporto, literaturo, kolektas postmarkojn, bildkartojn, kalendaretojn: SSSR 431 460 MASSR, ul. Pionerskaja 125 - 2

Bulgara komencanta esperantistino interesigas pri la estrada muziko, baleto, ŝatas legi fremdan literaturon kaj ŝatas legi pri la vivo de nia popolo: Nikolinka Hristova Nedialkova, str. Kableŝkov No 9, STORAJICA, okr. Veliko Ternovsti, BG-5150, Bulgario

Bozena Kluba /24 j./, Pollando, 14-100 OSTRÓDA, Pl. Tysiaclecia P.P. 10 VI/2 - deziras korespondi kun tuta mondo pri diversaj temoj. Ŝi deziras intersangi bildkartojn.

25jara pola laboristo interesigas pri turismo, literaturo, sporto, kolektas bildkartojn: Arkadiusz Gała, Pl-58-420 LUBAWKA, str. Kosciuszki 4/3, Pollando

Sergo Zapotoĉni, ul. Dmitrijeva 21-5, 327002 NIKOLAJEV-2 USSR - kolektas kaj intersangas bildkartojn, postmarkojn, librojn, diapozitivojn, fotojn ktp., korespondas tutmonde pri ĉiuj temoj.

anoncoj

Lernolibro de F.V.Lorenc serĉata

Okaze de 100jara Jubileo de Esperanto ni preparas por la jaro 1987 en urba Muzeo de Olomouc ekspozicion por publiko. Tiucele ni satas mencii la Unuan Lernolibron de Esperanto por ĉeĥoj el la jaro 1890. Ni volas kredi, ke inter viaj membroj iu posedas la libron. Ĉu ĉi povas pretigi fotokopion aŭ kseroksan kopion de la titolpaĝo en tri pecoj? Ni rekomencos per alsendo de bona libro, nome esperanta traduko de detektiva romano de Ladislav Vladyka MI EN LI, kiun eldonis esperantista eldonkompanio de Olomouc - Moraviaj Esperanto-Pioniroj. En la nomo de Esperantista rondeto de Parko de kulturo kaj ripozo, loka grupo de ĈEA Vlastimil Blažek, Vilao Esperanto, Dvořákova 36, 77 200 Olomouc.

Pro náš kroužek hledám

dodavatele nových esperantských časopisů za úhradu podle dohody. Sbíráám nebo vyměňuji esperantský materiál /knihy, známky aj./. Stanislav Linhart, Kosmonautů 164, 539 09 Pardubice 8.

Ĉiulandaj Pacpropagandiloj Serĉataj...

Samarkanda Esperanto-Klubo de Interpopola Amikeco daŭre kolektas ĉiulandajn kaj ĉiulingvajn porpacajn plakatojn, flugfoliojn, fotojn, /infan/desegnaĵojn, librojn, leterojn pri paco, revuojn, ĵurnalojn, lumbildojn, insignojn, gluaĵiŝetojn, postmarkojn, ĉiujn ceterajn pacpropagandilojn. La materialoj estas serĉataj por la jam tradiciaj internaciaj porpacaj ekspozicioj kaj fondota Muzeo de Paco. Tiuteme oni korespondas en Esperanto, rusa, angla kaj laŭbezome de aliaj lingvoj. Bonvolu adresi ĉion al: INTERKLUBO "ESPERANTO", SU-703000, SAMARKANDO, Glavpoĉtamt abon. ĵa. 76, Uzbekistano, USSR. Respondo kaj laŭdezira rekompenco garantiata. Validas ĉiam. Represo kaj maĉilingvaj anonctradukoj petataj.

750 jaroj de Berlin

En 1987, la logentoj de Berlin festos la 750jaren ekziston de ilia urbo.

Kune kun la subdistrikta estraro de Libera Germana Junularo /FDJ/, Junulara Esperanto-Grupo /en Berlin-Marzahn/ deziras organizi internacian ekspozicion. Ĝia devizo estos: "Gastoj el la tuta mondo vidas nian Berlinon - urbo de la paco". Precipe ni turnas nin al junaj Esperantistoj kaj al tiuj, kies koro batas por la junularo.

La enhavon de tiu ekspozicio konsistigu fotoj /formato 9x12 ĝis 18x24 cm/, desegnaĵoj, bildoj, rakontoj kaj raporto. Per ili estu videblaj viaj tute privataj impresoj pri tiu nia urbo.

- Kio plaĉis al Vi, kio impresis Vin?
- Kiel Vi vidis la vivon de niaj civitanoj en batalo por pacgo?

Ekde nun ĝis la la de oktobro 1986 ni atendas Viajn kontribuaĵojn. Poste ni kunmetos la ekspozicion, kiun oni povas rigardi en 1987 je pluraj lokoj en Berlin.

Vi rericevos Viajn kontribuaĵojn, se Vi tion deziras. Al ĉiuj kontribuontoj ni sendas honordiplomojn. La plej bonaj kontribuaĵoj estos premitaj kaj publikigitaj.

Ni petas Vin ĉiujn subteni nian entreprenon kaj per tio pravi la avantaĝojn kaj la kapablon de Esperanto kiel lingvo kaj kiel movado.

Nia adreso: Junulara Esperanto-Grupo
en Kulturbund der DDR

DDR 1141 Berlin-Marzahn
Prignitzstrasse 100
/Ausstellung '87/

Ekspozicio en Florurbo

Esperanto-Klubo de Quedlinburg aranĝos internacian ekspozicion okaze de tradicia Florfestu en aŭgusto 1986. Por montri la disvastigon de Esperanto ni atendas bele afrankitajn bildkartojn el tutmondo. Bonvolu tuj skribi al s-eno Klaus Klimt, Gartenstr. 16, DDR-4300 QUEDLINBURG, GDR.

Kiu helpos?

Red.Reinhard Haupenthal el okcidenta Germanio tre ĝojus, se iu helpus al li kompletigi la arkivon per:

Český Esperantista: 1 /1903/: 1-5.7.

Casopis českých esperantistů: 1 /1907/: 1-8.11-12. - 2 /1908/: -4 /1910/: ĉio. 5 /1911/: 1.3-12. - 6 /1912/: 1.2.4-6.8.-12. -7 /1913/: 1-7.9-12. -8 /1914/: 1-3.5.-12.

Zprávy: n-roj 1-24, ĉio post 31 /se aperis?/

El Popola Ĉinio: 1950: 2.6. /La solaj mankantaj en la tuta kolekto.

Informilo de Germana Eo-Ligo en Ĉeĥoslovakio: 1934: 1.8-12. - 1935: 5-12. - 1936: 2-12.

Li volonte pagos per libroj aŭ alimaniere.

Mi petas skribi al Eli Urbanová, Velešlavínská 47, 162 00 Praha 6.

Dek du mil galeriojn kaj muzeojn de la mondo vizitas ĉiujare ducent dudek ĝis ducent tridek milionoj da vizitantoj. Statistiko de Unesko samtempe notas, ke dum pasintaj kvardek jaroj ankau pli grandigis la nombro da vizitantoj-ŝtelistoj. De la jaro 1945 oni ŝtelis el muzeoj kaj artgalerioj pli ol kvardek unu mil artverkojn kaj preskau kvardek du mil diversajn antikvaĵojn.

En Kembrigo oni malkovris ĝis nun nekonatan manuskripton de versa prezentaĵo, verkita de Sekspiro, titolita Edmund Ironsid. Laudire temas pri la unua dramo de la fama aŭtoro. Ĝi konsistas el pli ol du mil versoj kaj fakuloj pravas, ke ĝi enhavas 200 vortojn, kiujn "elpensis" Sekspiro mem.

konversacio

ENKONDUKE

Por pliebligi la konversacion dum kunvenoj, kursoj kaj renkontigoj estas prezentataj dudek temoj el la vivo. Ĉiu temo estas fundamento por la konversacio, kiun sperta esperantisto povas gvidi laŭ ĝi. Oni povas simple traduki la temon, sed pli efika estas la maniero, kiam ĉiuj konversaciantoj unue mem tralegas la temon kaj la gvidanto poste formulas siajn demandojn en la senco de tiu temo. Pli poste povas alterniĝi ĉiuj konversaciantoj. La temo estas poste firmigita per ekzercoj kaj per aplikado al persono de ĝiu kursano. Oni povas trovi ĉe aliaj eluzojn de unuopaj temoj. Oni strebas klarigi ĉion nur per Esperanto, do la antaŭa preparo helpas trovi nekonatajn terminojn kaj eligi la uzadon de la nacia lingvo.

Josef Chvosta

Unua temo: FAMILIO kaj KOLEKTIVO

La malplej granda parto de la homara socio, familio, konsistas el gepatroj kaj iliaj gefiloj. La gepatroj estas reciproke geedzoj, la gefiloj gefratoj. Sed en multaj familioj vivas ankoraŭ aliaj geparencoj. Avo estas patro de unu el gepatroj. Nepo estas filo de propra filo aŭ filino. Onklo estas frato de unu el gepatroj. Nevo estas filo de unu el gefratoj. Kuzo estas filo de onklo. Boparencoj estas la geparencoj de la dua edzo. La listo de geparencoj, precipe de ĉiuj prauloj aŭ antaŭuloj, ĉe mortintoj, estas geneologio aŭ generacia tabelo. Oni distingas diversajn gradojn de parenceco, kio estas grava por heredo.

La familion fondas du plenkreskaj gehomoj, kiuj interkonatiĝis dum diversaj okazoj, enamiĝis aŭ amindumis dum siaj rendevuoj kaj fianciĝis. Kutime viro svatigas pri virino, kiu plaŝas al li, sed la virino helpas per koketado kaj flirtado. Iam agis svatisto, nun estas svatoficoj. La geedziga ceremonio, nomata nupto, okazas oficiale kaj solene. Estas nupta regaĵo, poste la geedzoj entreprenas plej ofte mielmonatan vojaĝon. Ili kontentigas korpe en koito, per kiu oni povas estiĝi novan homon. La virino koncipas, ŝi estas graveda, ĉar en organo de ŝia ventro, utero, ekestas embrio, el kiu poste estas fetu. Post naŭ monatoj la virino akŭŝas, plej ofte en hospitalo, kaj naskas idon, iam dumaskitojn aŭ gemelojn, aŭ ĉe plurnaskitojn. Dum la akŭŝo helpas akŭŝistino, iam ĉe kuracisto. La gepatroj zorgas pri infanoj kaj edukas ilin. Komence la suĉinfano nur sucas lakton el mamoj de ŝia patrino, kŭŝas kaj dormas alie bezonante multajn vinĉotukojn. Poste la bebo jam komencas interesigi pri la ĉirkaŭaĵo, unue ĝi rampas, pasas eble post unu jaro, kreskas, mangas jam normale, estas knabo, iam petolanta bubo, fraŭla junulo, iam malsimpatia

dando, plenkreska homo kaj maljunulo. Puberiga periodo estas transiro inter infaneco kaj juneco. La homa vivo dauras mez-nombre sepdek jarojn kaj finas per morto.

Dum la vivo estas diversaj festoj, la homoj organizas golenojn per ceremonioj, regaloj kaj festenoj. Post la maskigo estas bapto, pri nupto oni jam parolis. Post la morto estas la kaĉavro metita en la cerkon kaj estas post sepulta ceremonio aŭ enterigita, entombigita aŭ kremaciita. La sepulta ceremonio nomiĝas funebro, inter la cerko estas kandeloj, kiuj brulas, kaj florkronoj. La funebra procesio akompanas la cerkon al tombo aŭ kripto, en la kremacio estas la cerko cindrigita kaj la cindro estas metita en urno. Pri mortinto skribas aŭ parolas nekrologojn.

Festotagoj estas internaciaj kaj ŝtataj, religiaj, ĉiu homo festas siajn naskig- kaj nomtagojn, datrevenojn kaj jubileojn de gravaj okazaĵoj. Al tio oni gratulas kaj toastas. Ofte oni ne laboras kaj ripozas.

Orfo estas infano, kies gepatroj mortis. Vidvo estas edzo, kies edzino mortis. Li povas edzigi al alia virino, tiel ekestas duonparencaro, ĉar duonparencoj ne estas samsangaj. Se geedzoj ne vivas harmonie, disputas kaj kverelas, la tribunala verdikto **eksedzigas** ilin. Tio estas divorco, **kiu** estas plej ofte konsekvenco de adultado. Viro kaj virino apartenas al diferencaj seksoj, nur el seksa kontakto povas ekesti novaj idoj.

La homo ankaŭ havas najbarojn, kiuj loĝas proksime, konojtojn, amikojn kaj kamaradojn. Renkontante oni salutas, riverencas aŭ komplementas, alie oni vizitas ilin, skribas salutkartojn kaj leterojn, gratulas kaj kondolencas. Estas samtempoj, samlandanoj kaj samregionanoj. Nacio estas samlandanoj parolantaj plej ofte la saman lingvon kaj vivanta en certa teritorio, kiu evoluis el familioj, klanoj, triboj kaj gentoj. Ili havis siajn idiomojn, kiujn oni nomis dialektoj, naciajn kostumojn, diferencajn morojn kaj kutimojn. Nuntempe tiuj diferencoj malaperas, sed folkloro strebas revivigi ion. Kolektivo estas aro de personoj komune agantaj aŭ laborantaj, en kolektivo estas kolegoj, alie la homoj kunigas en kluboj, societoj kaj aliaj organizaĵoj. La rilatoj inter homoj estas direktataj laŭ certa regularo, moralo. Kiu kondukas kontraŭ la moralo, estas krimulo, la juĝejoj aŭ tribunaloj tian homon arestas, punas, ja ekzekutas.

Tute fremdan homon oni alparolas, se necese, sinjoro. Por konatigo oni prezentas sin vorte aŭ per vizitkarto. La rilatoj inter homoj evoluas, ekzistas homoj civilizaj kaj primitivaj. La tuta aro da kontaktoj inter homoj, la sistemo de la edukado estas kulturo, la indigenoj estas homoj, kiuj delonge vivas en certa teritorio kaj al kiuj venas fremduloj, kiuj iam kondukas kiel gastoj, sed alifoje, precipe pro miskompreno venas malkonfido, malamikeco, unuj parolas pri aliaj kiel pri sovaguloj, ili ne vivas en paco, sed en milito. Ne ekzistas unu homa socio, sed estas diversaj nacioj, rasoj, partioj, klasoj, religioj ktp.

G r a m a t i k o: 1/ En la temo oni parolas nur pri "viroj". Formu nomojn pri virinoj kaj klarigu ilin.

2/ Elektu kvin substantivojn, formu el ili adjektivojn kaj diru ilin en frazoj.

3/ Skribu dek vortojn kun la prefikso ge- kaj klarigu.

S t i l o: 1/ Skribu laŭ faktoj pri via familio. Provu skribi vian generacian tabelon.

2/ Skribu regularon pri kondutado en certa kolektivo.

3/ Skribu salutkarton al via eksterlanda amiko.

4/ Diru toston al novgeedzoj.

D e m a n d o j: 1/ Kiom da praavinoj havas ĉiu homo?

2/ Kiuj viaj avinoj aŭ praavinoj vivas ankoraŭ?

3/ Kia estas diferenco inter embrio kaj feto?

4/ Kion oni faras kun la cindro de kremaciitoj?

5/ Kiom da jaroj ĝisvivas homoj en nia ŝtato, ĉu plimulte viroj aŭ virinoj? Kial?

Konferenco pri la ĉina lingvo, la ĝola unua tiatipa aranĝo okazinta en Pekino, akcentis, ke "Ĝiu civitano de Ĉinio devas ĝis la jaro 2000 regi la ĝeneralan ĉinan lingvon, ĉar la lingva malunueco baras la pluan evoluon kaj modernigon de Ĉinio". Malfacile povos plenumi ĉi taskon precipe ĉinoj el sudaj provincoj de la lando, kie ĉ. ducent kvindek milionoj da homoj, do ĉiu kvara civitano de Ĉina Popola Respubliko, parolas la t.n. kantonan dialekton, tute nekompreneblan norde. Kvankam la sudaj loĝantoj lernas la ĝeneralan ĉinan en lernejoj (same kiel en aliaj landoj fremdan lingvon), en normala vivo, eĉ en oficejoj kaj vendejoj, oni ĝin ne uzas. Vicoestro de Ĉina Ŝtatkonsilantaro Wan Li dum la Konferenco kritikis ankau la tendencojn "simpligi" la ĉinan signan skribmanieron dirante, ke signoj plue restos la skriba formo de la ĉina lingvo. Elreviĝintaj estis tiuj, kiuj supozis, ke miloj da ĉinaj signoj estos dum certa tempo anstataŭigitaj per t.n. pin-jin, skribmaniero, kiu helpe de literoj de la ordinara latina alfabeto esprimas sonan formon de ĉinaj vortoj.

Lau Rudé právo.

STARTO - presorgano de Ĉeĥa Esperanto-Asocio, Jilská str.10, CS-110 01 PRAGO 1, Ĉeĥoslovakio. Aperas 6-foje jare. Redakta komitato: Jaroslav Kašparec, Jaroslav Klement (grafika aranĝo), Miroslav Malovec, Jiří Patera (responda redaktoro) kaj Helena Štruncová. Presas RUCH Liberec. Transdonita al presejo la 26-an de majo 1986. Jarabono 24 CSK, por eksterlando 36 CSK aŭ 10,50 NLG, inkluzive de sendkostoj. Abonantoj turniĝu al niaj perantoj, al UEA aŭ rektavoje al nia asocio.

STARTO - nepravidelný věstník Českého esperantského svazu, Jilská 10, 110 01 Praha 1, vydávaný pro potřebu členů svazu. Vychází 6x ročně. Redakční rada: Jaroslav Kašparec, Jaroslav Klement (grafická úprava), Miroslav Malovec, Jiří Patera (odpovědný redaktor) a Helena Štruncová. Povoleno odborem kultury NVP č. 310008385 ze dne 18. 3. 1985. Tiskne RUCH Liberec. Předáno do tisku 26. 5. 1986. Dohledací pošta Praha 07. Snížený poplatek za poštovné povolen Ředitelstvím pošt Praha pod č.j. P/1-1267 ze dne 6. dubna 1979.

Výtvarná řemesla

Praha

**Vám nabízejí široký
sortiment bytových
doplňků a dárkových
a upomínkových
předmětů,
vyráběných převážně
v malých sériích
s častou inovací.**

NABÍZÍME:

**SOUSTRUŽENÉ MOCCA SOUPRAVY
SOUSTRUŽENÉ ODKLÁDACÍ STOLKY
MALOVANÉ PORCELÁNOVÉ SOUPRAVY
I JEDNOTLIVÉ KUSY
MALOVANÉ A BROUŠENÉ VÁZY, MÍSY
A POPELNÍKY
VÝROBKY Z CÍNU**

**BIŽUTERII KOVOVOU A KOŽENOU
A DALŠÍ SORTIMENT Z KOVU, KŮŽE,
KOŽENKY A TEXTILU**

Adresy prodejen upomínkových a dárkových předmětů:

110 00 Praha 1, Národní tř. 37	22 41 94
110 00 Praha 1, Vodičkova 28	24 47 71
110 00 Praha 1, Spálená 39	29 27 04
110 00 Praha 1, Na poříčí 35	23 17 315
110 00 Praha 1, Křížovnické nám. 2	26 63 28
120 00 Praha 2, Anglická 18	25 98 56
110 00 Praha 1, Lazarská 5	29 83 22
110 00 Praha 1, Železná 12	22 79 14
170 00 Praha 7, Obránců míru 17	37 44 84
110 00 Praha 1, Můstek – stanice metra	26 14 19
360 00 Karlovy Vary, Mariánská 2	930/28 381

**V našich prodejnách
naleznete
vhodné dárky
pro každou příležitost.
Naše pracovníce Vás
ochotně obslouží
a pomohou vybrat
předmět,
který potěší.**

Vzorkovna nábytku:

110 00 Praha 1, Václavské nám. 41	26 40 64
-----------------------------------	----------

přijímá objednávky na individuální zakázky
nábytku a bytových doplňků.

**Český esperantský svaz
110 01 PRAHA 1, Jilská 10**

NOVINY

Dohlédací pošta Praha 07
Snížený poštovní poplatek povolen
Ředitelstvím pošt Praha
J. ZN. P/1-1267/79 ze dne 6. 4. 1979